

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. Germanoj abonu ĉe sia poŝtoŝeĉejo.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 800 Kr.	Ceĥosl. 120 Kr.	Hungara 20 Kr.	Litova 20 Cd.	Rumana 3 Leol.
Belga 0.60 Fk.	Finna 1.20 Fmk.	Itala 0.70 Lir.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 40 Gmk.
Brita 3/4 P.	Francan 0.50 Fk.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.30 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 3 Levol.	Germana 120 Mk.	Jugosl. 1.00 Din.	Pola 150 Mk.	Svisa 0.30 Fk.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.50 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj Italvoj demando la prezon ĉe sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampilan Respond-Kuponon.

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adresŝanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svivan frankon (aŭ ĉe antaŭpaĝo 60 gmk.); rabato laŭ interkonsento.

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburg
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli Nort, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, Bucureŝti (Rum.)
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 7065, per Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Huiler, Max Butin.
Literatura red.: Zanoni.

ATENTU ĈIAM LA
PLEJ NOVAJN
PREZON KAJ KONDIĈOJN POR
ABONOJ KAJ ANONCOJ.

N-o 118 :-: Antwerpen, Barcelona, Bucureŝti, Edinburg, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 7. I. 23.

La Provo.

Por daŭre ekzistadi en sia ĝisnuna efika formo kaj eĉ ankoraŭ pliampliksiĝi, ET bezonas plimultiĝon de la abonantoj aŭ plialtiĝon de la abonprezo. Jam ripete mi deklaris tion. Nun mi volas fari la provon, ĉu la Esperantistaro ekkonos la valoron de ĉiusemajna Esperanta gazeto tiom, ke ĝi apogos ET-on sufiĉe por ebligi al la ĵurnalo daŭran ekzistadon kaj pliampliksiĝon sen plialtiĝo de l' abonprezo.

Kiel mi jam sciigis en n-o 116, ET de nun estos kompletigata per monata komerca numero sub titolo „Internacia Komercio“. Mia intenco estis komence eldoni tiun komercan numeron kiel kvinan numeron en la monato kaj kalkuli por ĝi la prezon de kiel unu ET-numero; tiamaniere la ponumera prezo ne altiĝus, kvankam la abonantoj pagus dum tuta jaro iom pli ol nun. Sed poste mi decidis alian aranĝon, precipe ĉar kelkaj opini-espirmintoj pri mia plano publikigita en n-o 115 insiste malkonsilas plialtiĝon de l' abonprezo.

Do, „Internacia Komercio“ ne aperos kiel kvina kromnumero en la monato; sed unu numero de ET en ĉiu monato havos komercan suplementon. Tiamaniere la legantoj de ET ricevos de nun en ĉiu monato du numerojn 4-grandpaĝajn kaj unu 6-grandpaĝajn (pro senpage aldonoj) „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“, por la sama prezo kiel ĝis nun.

Jen granda ofero kaj risiko niaflanke, kiun ni portos en la intereso de l' koncentriĝo. Mi forte esperas, ke eĉ la Esperantistoj, kiuj ĝis nun ignoris ET-on, laŭmerite subtenos nin por rekompenca nian oferon kaj nian riskemon.

Mi povas ankoraŭ malkaŝi al la gesamdeanoj, ke intertraktadoj kun alta Esp. gazeto de vasta disvastiĝo kaj bona reputacio pro kunfando kun ET supoze baldaŭ kondukos al same ĝojiga rezultato kiel la intertraktadoj kun ĝisnuna „Internacia Komercio Revuo“.

Pne mi povas sciigi, ke ankaŭ la literatura parto de ET, sub lerta redaktado de nia konata

stilisto Zanoni, kaj diversaj aliaj rubrikaj estas pliperfektigitaj ion post ion.

Do ni estas farantaj kaj farontaj ĉion eblan por evoluigi ET-on je la organo de la tutmonda Esperantistaro, tiu organo, kiun ĉiu Esperantisto devas aboni, se entute li pretendas esti rigardata kiel serioza samideano.

Gesamideanoj de la tuta mondo: la provo estas farota. Se vi deziras, ke ET ankoraŭ pliampliksiĝu sen plialtiĝo de l' abonprezo, abonu kaj abonigu, anoncu kaj anoncigu, kunlaboru konstante kaj energie! Helpu al ni plenumi la provon! Rekompencu nian bonan volon per via aktiva subtenado!

T. J.

Komerca Konferenco en Venezia.

(31. marto — 4. aprilo 1923.)

UEA invitis ĉiujn naciajn societojn ke ili bonvolu partopreni la internacian konferencon pri Esperanto por komercio kaj turismo en Venezia je Pasko 1923 sendonte oficialajn delegitojn kaj preparante raporton kun statistiko pri la spertoj faritaj en tiu duopa fako. Ĝi ankaŭ sin turnas al siaj delegitoj invitante ilin kaj proponante demandaron, kiu servos kiel projekto de tagordo por la konferenco. Interalie oni devus enketi ekzemple pri punktoj kiel la jenaj:

1. Esperanto en Komercio:

- Kiuj firmoj uzas la lingvon por korespondado? Plena informo kun indiko de branĉo.
- Kiuj firmoj eldonis prospekton, katalogon ktp. en Esperanto?
- Ĉu la firmao, entrepreno havas specialan oficiston por la esperantaj rilatoj?
- Kiaj rezultatoj estis atingitaj? (Atesto de uzantoj.)

2. Esperanto en Turismo:

- Kiu Turisma Societo, porfremdula organizo uzas Esperanton? (Plena informo kun detaloj.)
- Kiu eldonis gvidfolion, gvidlibron ktp. en Esperanto?
- Ĉu estas oficisto en la Turisma Oficejo parolanta la lingvon? (Kun nomo kaj adreso.)

rapide proksimiĝanta al illa domo. Ŝi alvenis senespere kaj timigite. „Panjo estas foriginta,“ ŝi diris. „Mi jam pensis, ke la komatinda maljunulino ne vivos plu longe,“ rediris Stefano. Anjo balancis la kapon. „Sed, ŝi ne estas en la lito, kaj ŝiaj vestoj estas for.“ „Dio gardu nin! vi frenezigiĝis,“ raŭke murmuris Stefano. „Estas neeble, ke ŝi iris malproksimen, ĉar ŝi ne havas la fortojn,“ diris lia edzino. Sed poste ili konsterniĝis, kiam ili konstatis la foreston de la kadukaĵo ĉevaleto kaj ĉaro. Je tagmezo oni trovis la maljunulon kuŝanta sur la fundo de l' ĉaro, duonvoje inter Meadowvale kaj ŝia dometo.

La tagon post la enterigo, Stefano iris al la banko, kaj la kvar filinoj kaj la du aliaj filoj atendis lian revenon en la domo. „Ĉu vi ĝin havas?“ aŭde komencis lia edzino. Stefano skuis nee la kapon. „Mi ne havas la monon, sed mi eksciis, kien la maljunulino iris je la mateno de sia morto. Ŝi mem jungis la ĉevaleton, veturis al la banko, kaj havigis al si la cent funtojn sterlingajn. Poste ŝi vizitis la ŝtonhakiston kaj aĉetis tomboŝtonon por si mem, kiu kostis tridek funtojn.“ „Tridek funtojn!“ resonis miksitaj horo de baso kaj soprano. „Cent minus tridek estas sepdek,“ diris la edzino de Stefano. „Ho!“ li respondis, „tute ne; deprenu tridek de cent, kaj la resto estas... sep pliaj ŝtonoj. Diabolo! ŝi aĉetis ŝtonon por ĉiu el ni.“

Esperantigis M. Emberson.

Tri regnoj.

De Victor Auburtin.

Monarĥo vizitis sian fidelan ĉefurbon, kie li intencas fari kelkajn paroladojn.

La stratoj estas kordone fermitaj. Ĉe la pordego oni konstruis tribunojn kun alnaltitaj blankaj

d) Kiaj rezultoj estis atingitaj? (Atesto de uzantoj.)

3. Esperanto kiel komerca instrufako:

- Kiu komerca lernejo (oficiala) instruas la lingvon? Ĉu devige aŭ nedevige?
- Same pri privataj komercaj iustifutoj?
- Same pri vesperkursoj de komercistaj societoj?

4. Servoj per UEA:

- Statistiko.
- Priskribo de tipaj komercaj servoj.
- Priskribo de tipaj turismaj servoj.

5. Publika subteno:

- Kiuj komercaj organizoj publike subtenis Esperanton? (Kun dato, teksto de rezolucioj.)
- Same pri turismaj organizoj.

6. Agadprogramo.

- Enketu ĉe favoraj firmestroj; notu ilian juĝon kaj konsilon por estonta agado.
- Informigu pri opinio de komercaj kaj turismaj organizoj, interesante ilin pri la konferenco. Sendu al UEA adresojn de tiuj, kiujn ĝi devus inviti al Venezia.

Ni tre bone scias, ke la sperto en tiuj fakoj estas ankoraŭ malgranda, sed oni devas ĝin klasigi kaj utiligi kiel instruon. Aŭdinte la faktojn pozitivajn kaj ankaŭ negativajn, la konferenco poste povos diskuti la rimedojn por faciligi praktikan uzadon de Esperanto en komercio kaj turismo. La faktaro kaj rekomendaro poste donota sub forme de resume broŝuro povos efike helpi al estonta agado, same kiel la raporto pri la Geneva konferenco en alta fako.

Partoprenos en Venezia kompetentaj personoj kiel s-o Stettler, prezidanto de UEA, s-o Barton Kent, komitatano de la Internacia Komercio Ĉambro, de la Londona Komercio Ĉambro kaj prezidanto de la Anglo-franca Societo, s-o John Merchant, prezidanto de la Federacio por komuna komerca Lingvo, s-o Cherbanc, ĝenerala sekretario de la Komercio Ĉambro en Tarare, s-o Balliman, prezidanto de la Ĉambro de Komercistoj je Vitro en Parizo, Prof. D-ro Dieterle, prezidanto de la Interfoira Komisiono, s-o Titta, direktoro de la Folro en Padova, D-ro Ĉe-u-vaĵ, direktoro de la Ĉina Sekretariejo ĉe la Ligo de Nacioj, s-o Janagida, japana membro de la Konstanta Komisiono pri Koloniaj Mandatoj ktp.

Ni rajtas esperi, ke ĉiuj komercaj aŭ turistaj organizoj kiuj vere deziras la oficialigon de

komuna komerca lingvo, sendos energian reprezentanton al la konferenco por grupigi siajn fortojn kaj konsenti pri efika agadprogramo por la estonto.

Ni ne atendas multnombrian kunvenon, sed seriozan kaj decideman.

La partoprenantoj bonvolu sin anonci tuj ĉe UEA. La loĝado kaj manĝado en la hotelo de UEA kostos po 30 litroj tage. Ĉio plej ŝpareme, sed komforte, kondiĉe ke oni sin enskribu frue.

Donacojn por efika sukcesigo de la konferenco oni direktu al Universala Esperanto Asocio, 12, Boulevard du Théâtre, Genève.

La Kvara Internacia Labora Konferenco.

La Kvara Kunsido de la Internacia Labora Konferenco de la Ligo de Nacioj okazis en Genève de la 18-a de oktobro ĝis la 3-a de novembro. En tiu kunsido la konferenco sin okupis precipe pri la plibonigo de ĝia propra organizo. Ĉi tiun la parton XIII-a de la Pakkontrakto starigis laŭ ĝiaj linoj ĝeneralaj, kaj la Unua Konferenco formulis la pli detalajn regulojn pri procedo k. t. p. Sed la sperto montris neeviteble lujan mankojn. Estas nur en la mitologio, ke la diroj naskiĝas tute kaj perfekte armataj; en la realeco, estas ĉiam necese provi la armilojn, kaj la provo plejofte malkaŝas ion, kio bezonas ĝustigon. Tial la Kvara Konferenco, ĝis komence, en la estantaj cirkonstancoj, ne tro aldoni al la projektoj de diversaj ŝtatoj jam atendataj konfirmon, uzis la okazon por ekzameni sian armilaron kaj korekti la mankojn, fakte malmultajn, kiujn la trijara sperto aperigis.

Oni tre zorge konsideris la regularon kaj starigis procedan sistemon, kiu malebligis dubojn kaj malkomprenojn malfacile antaŭvideblajn ĉe la kunveno en Washington. La procedo estas unu el la plej gravaj punktoj rilate al internacia konferenco, speciale konferenco, kiun 55 ŝtatoj rajtas ĉeesti; kaj kiun ĉeestas eĉ tiun ĉi jaron, kiam oni diskutas precipe demandojn pri organizo, cent delegitoj kaj preskaŭ egala nombro da teknikaj konsilantoj, venintaj el 35 ŝtatoj. Sen simplaj kaj klaraj reguloj, tia konferenco efektive malmulton, kaj perdas multe da tempo je vanaj diskutadoj.

Eĉ pli grava klopodo pri plibonigo de la organizo estas la decido de la konferenco, rekomendanta revizion de la pakkontrakto en la celo reformi

lian veturilon, kiu preterveturas malrapide, paŝe akompanate de la plej noblaj virinoj de l' urbo.

Oni veturas katedralon, ĉar neniu alia ejo en la urbo estas sufiĉe granda por la nombro de disĉiploj, kaj post orgenludo la filozofa komenco sian paroladon pri la limoj de l' eterneco.

Vespere la gazetoj raportas, ke la belaj brunalbukloj de l' majstro jam komencas grizigi.

Tio ĉi estas la regno de la spirito, — kiun ni devos ankoraŭ longe atendi.


Tradukita B. L. H., Ismail, Rumanio.

La malsanulo.

Originale verkita de Albert Meckenstock.

En blanke tegita hospitala lito kuŝas grave malsaniĝinta junulo, pala, sendorma, silenta. El la bluega ĉielo la brilanta somersuno sendas malsupren varmigitajn radiojn en la ĉambron. En la fenestra niĉo dancas polvoj gaje tra la radiaro. Sed la malsanulo nek sentas la enpenetrantan varmon, nek vidas la ĝojan dancadon, kontraŭe, fortege, skuanta frosto igas lin klaki la dentojn kaj tremi la tutan korpon. La juna viro, malproksime de sia patrujo, ne havas plu vivkuraĝon, sed nur la unusolan penson: morti plejeble baldaŭ kaj esti enterigata profunde, profundege en la teron, por fine varmigi kaj esti sen frostotremo. Jam li sentas alproksimiĝi la sendintojn de la morto. Nebula vualo etendiĝas antaŭ liaj pro febro brilantaj okuloj, liaj oreloj ŝajnas esti plenŝtopitaj per vato, lia korpo elstreciĝas, brakoj kaj kruroj estas penetritaj de stranga rigidigo, liaj lipoj malfremiĝas kaj elkrias per lasta penado jenajn vortojn, komence per fortega, akra voĉo: „Enterigu min, profunde, profundege en la teron.“ Iom post ion la kri

*) Kun permeso de „Daily News“, Londono.



La Internacia Labora Oficejo en Ĝenève.

la konsiston de la Administra Konsilantaro, kiu direktas la Internacian Laboroficejon. Laŭ la kontrakto, la Administra Konsilantaro konsistas el 24 membroj, 12 reprezentantaj registarojn kaj po 6 reprezentantaj mastroj kaj laboristojn. El la 12 registaraj reprezentantoj 8 estas nomataj de la 8 ŝtatoj de plej granda industria graveco. Dum la trijara ekzisto de la organizaĵo, multe da malkontenteco montriĝis ĉe la ekstereŭropaj ŝtatoj pri ilia reprezentado en la Administra Konsilantaro, reprezentado kiun ili opinias nesufiĉa. Krom tio, la sperto pensigis, ke la „tutmonda labora komitato“ estus multe pli reprezenta, se ĝi estus pli multinombra. Tial la konferenco decidis, ke la nombro de la konsilantaro plimultiĝos ĝis 32, el kiuj 16 reprezentos registarojn kaj po 8 mastrojn kaj laboristojn, kondiĉe ke 6 el la registaraj reprezentantoj kaj po 2 el la mastraj kaj laboristaj reprezentantoj apartenos al ekstereŭropaj ŝtatoj.

La demando pri la „ok ŝtatoj de plej granda industria graveco“ estis tre disputata demando depost la Washingtona kunveno. La konsilantaro de la Ligo de Nacioj nomis komitaton por ekzameni la aferon, kaj kunveno de la Ligo aprobis la raporton de tiu komitato lastan septembron. En tiu ĉi raporto Kanado kaj Hindujo aperas la unuan fojon kiel „ŝtatoj de plej granda industria graveco“. Oni proponis al la konferenco, ke la ideo de la „ok ŝtatoj“ estu forlasata, kaj ke la kontrakto nomu la jenajn ses ŝtatojn, kiel rajtigataj de la dua sideo en la konsilantaro: Granda Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo kaj, se kaj kiam ĝi aliĝos al la organizaĵo, Usono. Tiu aranĝo lasus 10 seĝojn, al kiuj aliaj ŝtatoj estus elektataj de la registaraj delegitoj ĉe la konferenco. Per elokventa parolado la Kanada Mara Ministro, s-o Lapointe, postulis la tenadon de la formulo pri la ok ŝtatoj, speciale ĉar la komitato de la Ligo estis plene diskutinta la temon kaj ĵus atingis konkludon. Li diris, ke Kanado tute volonte forlasas sian pretendon, se ĉiuj 16 reprezentantoj estus elektataj de la konferenco; sed, se oni donus antaŭlecon, tio devus esti donata al la ok difinitaj sed nenomataj ŝtatoj kaj ne al ses ŝtatoj nomataj nunfoje por ĉiam en la kontrakto. Similan opinionon esprimis s-o Beau, Hinda registara reprezentanto, kaj la konferenco fine decidis lasti al la ok ŝtatoj de plej granda industria graveco la privilegion nomi reprezentantojn en la Administra Konsilantaro.

Oni ankaŭ tre funde diskutis la demandon pri jaraj konferencoj. Laŭ la packontrakto, la konferenco devas kunveni „almenaŭ unufoje ĉiujare“. Opozicio kontraŭ la oficejo de la kunvenoj fariĝis, parte pro la laŭdira risko sufoki la naciajn legdonantojn per la multnombraj konfirmotaj decidoj, kaj parte pro la grandaj elspezoj kaŭzita de la sendado de delegitoj kaj teknikaj konsilantoj el malproksimaj landoj. Oni proponis dujarajn kunvenojn, aliffoje, kiu bezonus plan revizion de la packontrakto. La plimulto el la laboristaj delegitoj speciale favoris la okazigon de la ĉiujaraj

kunvenoj, kaj la konferenco decidis favore je tiu principo. Ĝi tamen rekomendis ke la Konferenco havu alternajn kunsidojn por preparo kaj decido. Tial, unu kunsido sin okupos pri la ĝenerala diskutado de projektoj por konvencioj kaj rekomendoj, pri kiuj oni voĉdonos per simpla plimulto, kaj la fina voĉdono pri tiuj decidoj, kiu, laŭ la packontrakto, devas esti per tri-kvarona plimulto, fariĝos ĉe la malfermo de la sekvanta kunsido.

Alia rezultato el la praktika sperto de la organizaĵo estas la decido pri elmigrado. Tiu ĉi temo estas aparte konvena al la konsiderado de tutmonda labora konferenco. La elmigranto, same kiel la maristo, estas internacia persono. De la komenco de sia ekzistado, la Internacia Laboroficejo studadis tiun problemon en la celo de tutmonda reguligo. Tre frue tamen ĝi eltrovis, ke la informoj kiuj povus servi pro tia reguligo, precipe se oni volus daŭre solvi la problemojn praktikajn, estas tute nesufiĉaj kaj nekontentigaj. La difino de „elmigranto“ diferencas de lando al lando; la ciferoj kolektataj de diversaj landoj ne rilatas al la sama periodo; fakte efika komparado de informoj, por havigi ĝeneralan perspektivon, ŝajnas neebla. Estis sekve necese komenci absolute per la komenco kaj organizi statistikojn antaŭ ol organizi elmigradon.

La konferenco balotis per 87 voĉoj kontraŭ rekomendo, ke ĉiu ŝtato membro de la Internacia Labora Organizaĵo komuniku al la Internacia Laboroficejo ĉiujn disponeblajn informojn pri elmigrado, repatriigo, transiro de elmigrantoj je eliro kaj reiro, kaj pri rimedoj alprenitaj aŭ projektitaj rilate al tiuj aferoj, kaj ke tiujn informojn ĝi komuniku ĉiutrimonate kaj ne pli ol trimonate post la fino de la periodo al kiu ili rilatas. Oni ankaŭ rekomendis, ke ĉiu ŝtato klopodu kion eble komuniku ĉiujare siajn kompletajn ciferojn pri elmigrantoj kaj enmigrantoj, specifkante: 1. sekson, 2. aĝon, 3. profesion, 4. naciecon, 5. landon de lasta restado, 6. landon de intencita restado. Fine, oni rekomendis, ke la ŝtatoj interkonsentu pri unuforma difino de la vorto „elmigranto“, pri uzo de unuformaj legitimaj paperoj, kaj pri unuformaj metodoj por registrado de statistikaj informoj. Virinaj delegitoj sin interesantaj precipe pri la forigo de la komerco je virinoj kaj infanoj postulis pliajn detalojn pri aĝo kaj sekso. Sed la konferenco opiniis ke ne konvenas tro peti de la registaroj en ĉi tiu momento, kiam budĝeta ŝparemo tiel necesas en ĉiuj landoj. Oni balotis tamen rezolucion atentigantan la Oficejon pri la graveco de specifika laŭaĝa klasifiko, kaj alian kiu deziras daŭrigi la kunlaboron kun la Ligo de Nacioj rilate al la komerco je virinoj kaj infanoj.

Estas certe, ke dum la malsado de la tempo, la Internacia Labora Konferenco disvolvigas pli kaj pli la karakteron de tutmonda parlamento. Nenio pli frapante montras tiun disvolvigon, ol la plena kaj detala diskutado de la jara raporto de la direktoro kaj la ĝenerala debato pri diversaj temoj al kiu tiu diskutado donas okazon. La ebleco de tia debato, tiel „parlamente“ farita, malgraŭ la malfacilaĵoj kaŭzita de la uzo de du oficialaj lingvoj*, atestas la kreskantan vivecon de la organizaĵo.

Unu el la plej gravaj demandoj traktitaj en la ĝenerala debato estas tiu rilate al la konfirmo de la Washingtona konvencio pri la okhora laborotago. Ĉi tie tre malmulte da progreso estis farita kaj ne multe da utilaj proponoj fariĝis en la diskutado. La mastraj delegitoj faris komunan

* Se jam el uzado de du lingvoj rezultas malfacilaĵoj konsentitaj de la Int. Lab. Of. mem (kiu transsendis al ni la raporton) kiom kreakos tiuj malfacilaĵoj ĉe pli multaj lingvoj! Ĉu la tempo ne ŝajnas veninta, en kiu oni klopodu eviti tiujn malfacilaĵojn postulate — ne nur permesante — la unu: Esperanto. (Red.)

igos vian ĝisnunan vivon en la samaj cirkonstancoj kvazaŭ vi ne estas mortinta. Nun vi havas sufiĉe da tempo pripensi viajn faritajn pekojn, penti ilin kaj se via animo estos tute purigita, vi fine eniros la veran ĉielon.“ Kaj dirinte tion, Di-patro forlasis la ĉambron. La junulo estas nun denove tute sola, fermas la okulojn kaj ripozas kviete. Liaj pensoj forflugas teren; li pripensas, ke eble nun alvenas la horo de lia enterigo. Li aŭdas streĉe por povi aŭskulti la solenan sonorilintadon, kiu eble akompanas lian enterigon. Jen, el la plej malproksima profundegaĵo alvenas al liaj oreloj tute malklare sonoj de preĝejoj sonoriloj. Li penadas aŭskulti pli bone; la bruado de la svingiganta, sonanta sonorilaro alproksimiĝas pli kaj pli, fine li aŭdas la sonadojn super si. Mirigite li malfermas la okulojn, vidas la klaran, luman lunon, kiu verŝas sian brilon en la ĉambron, kaj sentas, ke la sonorilsono venas el la najbara katedrala sonorilejo. Li nur havis profefbran sonĝon kaj — bone trapasis la krizon.

Kanto.

Vi ridetas kaj elektrilas
Via neĝoblanka dentaro:
Ĉu vi volas mordi?
Estus vane, ĉar en mi nenio estas mordebla.
Vi ekrigardas min kaj el viaj
Okuloj eksaltas fajrero:
Ĉu vi volas bruligi?
Estus vane, ĉar en mi nenio estas brulebla.
Vi ekkantas, riveregas tonoj
El via gorĝo. Ho ve al mi! Ho ve al mi!
Viaj akraj dentoj, viaj okulfajreroj
Neniul domagas mian koron.
Sed via kanto ĝin penetras
Kaj konfuzas, ĉar ĝi mem
Estas ankaŭ nur kanto. Aladar Báu.

deklaron esprimantan la malfacilecon apliki la okhoran tagon en la nuna tutmonda ekonomia situacio. S-o Jouhaux, la franca laborista delegito, kontraŭe bedaŭregis la malinklinon de la registaroj konfirmi la konvenciojn, kaj timis la malfidon pri la Internacia Labora Organizaĵo, kiun la nekonfirmo certe venkos ĉe la laboristoj. La direktoro esperis, ke per la studoj de la Oficejo konsulte kun la diversaj registaroj, oni trovos rimedojn por forigi malfacilaĵojn kaj plirapidigi la konfirmon de konvencioj. Estas klare, el pluraj paroladoj, ke malgraŭ la nekonfirmo de la konvencio la okhora laborotago estas praktike norma en ĉiuj gravaj industriaj ŝtatoj.

La demando pri senlaboreco ankaŭ sin prezentis okaze de aparta raporto de la direktoro pri la nuna situacio kaj la rimedoj alprenitaj en diversaj landoj. S-o Poulton faris kortuŝan alvokon al la konferenco, por ke ĝi klopodu „alporti esperon kaj ĝojon al tiuj milionoj da virinoj kaj virinoj, kiuj tiom suferas nuntempe je ilia vivo“. Delegitoj de ĉiuj grupoj, la registara, la mastra kaj la laborista, insistis pri la neceso studi internaciajn rimedojn kontraŭ la senlaboreco. La konferenco komisiis al la Oficejo daŭrigi la jam komencitajn esploradojn pri senlaboreco kaj speciale ekzameni la problemojn pri sezona senlaboreco kaj periodaj krizoj.

La konferenco akceptis gravegan rezolucion proponitan de la laboristaj delegitoj komisiantan al la Internacia Labora Oficejo fari enketon pri la vivnivelo de la laborista klaso, kompare kun la antaŭmilita nivelo, en Germanujo kaj la ceteraj landoj havantaj grave malaltigitan valuton, por klarigi la situacion, kaj por konstati la rimedojn jam enkondukitajn aŭ projektitajn en tiuj landoj por garanti al la laboristoj salajron certigantan taŭgan vivkondiĉon.

Unu el la principoj, kiujn laŭ la packontrakto „ĉiuj industriaj socioj devus peni apliki tiam, kiam ĝin ebligis la specialaj cirkonstancoj, en kiuj ili povus troviĝi“ estas „la pago de salajro certiganta al laboristoj taŭgan vivkondiĉon“, kaj pluraj delegitoj esprimis lian maltrankvilecon pri la ebla grava plimalboniĝo de la vivkondiĉoj de la laboristoj en malmalvalutaj landoj.

La Kvara Internacia Labora Konferenco faris nenion sensacian, sed ĝia historio estas rakonto pri pacienca laboro kaj solidaj rezultatoj. Estontaj konferencoj dankos ĝin por la plibonigita regularo, kiu faciligos iliajn laborojn, kaj ĝiaj diskutoj kaj decidoj ne povos ne influi estontan leĝfaron naciajn kaj internaciajn. Kaj estus maljuste fini la rakonton sen laŭdi la afablecon, paciencon kaj delikatecon de Lord Burnham, kiu la duan fojon prezidis la konferencon kaj aplikis al la tasko sian grandan parlamentan sperton kaj konon. Se estontaj konferencoj dankos la Kvaran Konferencon por ĝiaj bone direktitaj klopodoj, ili ankaŭ dankos Lord Burnham por la saĝeco kaj firmeco de lia gvidado.

Ligo de Nacioj. — Int. Labora Oficejo. Divizio pri informoj kaj interrilatoj.

Flugfolioeto.

Ni ne nur parolu kaj skribu, sed ankaŭ ni kantu Esperante! La multaj vokaloj, kaj entute la belsoneco de nia lingvo ĝin ekstreme taŭgigas por la kantado. Krom tio mi speris, ke nenio pli multe vigligas ĉu la instruadon en kursoj ĉu regulajn kunvenojn de grupoj aŭ festajn aranĝojn ol ĝustatempa intermeto de Esperanta kanto. Ni havas tre belajn Esp. kantojn originalajn kaj tradukitajn el naciaj lingvoj. La malmultaj kanteblaj originaloj (Himno, Tagiĝo, La bela verda stelo ktp.) estas ĉie konataj kaj (kelkfoje eĉ tro ofte)

Humoro.

La gazettfondisto.

1.
Ĉe la pordo de la ĉielo frapetis tera homo kaj deziris eniri.
Sankta Petro malfermis la pordon kaj demandis:
„Kiu vi estis sur la tero?“
„Mia nomo estas...“
„Tio ne estas grava ĉi tie,“ interrompis lin Sankta Petro, „diru al mi, kion vi faris?! Ĉu vi faris ion malbonan?“
„Mi fondis novan Esperantan gazeton...“
„Sufiĉas!“ denove interrompis lin Sankta Petro, „la ceteron mi jam scias! Foriru!“

2.
Ĉe la pordo de la infero frapetis tera homo kaj deziris eniri. La gardistdiablo malfermis la pordon kaj demandis:
„Kiu vi estis sur la tero? Ĉu vi faris ion bonan?“
„Ne!“ respondis fiere la homo, „mi fondis novan Esperantan gazeton!“
„Sufiĉas! Tro bona por la infero! Foriru!“

3.
La malfeliĉa homo revenis al la tero kaj — fondis novan Esperantan gazeton.

La frato.

Vanta babilemulo kondukis sinjorinon al festena tablo. Komence de la supo li enuigis ŝin per siaj privataj aferoj, kiujn li rakontis al ŝi plej detale. Fine li komencis priskribi ĉiujn membrojn de sia familio: la geavojn, gepatrojn, tri fratinojn. „Krom tio mi havas ankaŭ fraton; strangamaniere

kantataj. Mi nur dezirus, ke oni kantu ilin (precipe la Himnon) ne malrapide kaj melankolie kiel funebran melodion, sed vigle, gaje kaj entuziasme kiel marŝon. La kantoj tradukitaj el naciaj lingvoj estas nature (sed bedaŭrinde) malpli konataj internacie, kvankam ili estas tre konigindaj kaj interesaj pro tio, ke ili funde informas pri la pens- kaj sentmaniero de iu popolo; ĉar mi parolas speciale pri popolaj kantoj. Laŭ mia opinio ekzistas nenio pli taŭga, anime proksimigi la popolojn unu al alia ol iliaj simplaj kantoj, kiuj venas rekte el la koro. Mi do proponas, ke la diverslandaj Esperantistoj interŝanĝu siajn Esp. tradukitajn popolokantojn. La koncernaj eldonejoj atentigu speciale pri tiaj kantoj en la Esp. gazetoj.

Ple mi diru, ke la kantado de belaj popolokantoj Esperantigitaj estas bonega rimedo por interesumi kaj varbi novajn amikojn por nia afero. Aŭdante konatan al ili melodion, la neesperantistoj sekvas kun scivolo la Esp. tekston kaj konstatoj je sia granda miro, ke multon ili jam komprenas. Ili provos zumi akompane la Esp. vortojn kaj ne forgesos plu la dolĉajn sonojn. Ili estas kaplitaj de Esperanto kaj ofte fariĝos entuziasmaj Esperantistoj. Tiamaniere ankaŭ mi fariĝis adepto de nia movado.

Fine vorto de averto:

Multaj Esperantistoj (eĉ tute nove bakitaj) ne povas kontraŭbatali la tenton verki Esp. poemojn. Plej ofte iliaj produktoj estas nefatigaj pro malatento al ritmo, rimoj kaj eĉ fundamentaj reguloj gramatikaj. Se ili efektive ne povas subpremi la aluditan emon (nia literaturo pro tio ne pereus), ili provu almenaŭ traduki Esperanten naciajn tekstojn kanteblajn, anstataŭ krimfari ridindajn „apoteozojn“ sub la preteksto de „Icentia poetica“. Ili sidigu antaŭ fortepiano kaj penu adapti la tradukon precipe al la muzikaj ritmo kaj akcento. Tiamaniere — se ili sukcesos — ili helpos al pliproksimiĝo inter la popoloj, ĉar ili verŝos hejman kulturon inter la anojn de aliaj nacioj. Tamen: verkadon de poemoj kuraĝu entrepreni nur la plej instruitaj samideanoj, al kiuj la naturo donis la talenton de poeto. Ĉar la „postpoeto“ devas esti same vera kaj valora poeto kiel la originala. Z.

Foiro de Esperanto.

La ĉefcelo de la foiroj estas deŝargi la ŝtatajn ŝultrojn rilate al prosperigo de la ekonomia evoluo en konkerna regiono. Tial ili ludas gravan rolon kiel kulturfaktoro kaj ampleksas preskaŭ ĉiujn branĉojn de la ekonomia kaj



Lord Burnham, prezidanto de la IV-a Internacia Labora Konferenco, sabskribante la aktojn de la Konferenco.

li estas en ĉiu, efektive en ĉia rilato, la rekta malulo de mi. Ĉu vi konas mian fraton?“

„Bedaŭrinde ne,“ diris la sinjorino kun afabla rideto, „sed mi ŝatus konetiĝi kun li. Laŭ via priskribo li estas certe ĉarmegulo.“

Oni konatiĝis.

La rusa poeto Apuhtin estis tre miopa. Foje sur strato li neintence puŝis tro elegantan dandon. La dando haltis kaj siblis tra la dentoj:

„Malsaĝulo!“
Apuhtin ankaŭ haltis, demetis ĝentile sian ĉapelon kaj diris sin prezentante:

„Apuhtin! Estis por mi agrable konatiĝi kun vi.“

Listo de la donacintoj por la XV-a.

Donaca kaso.

Mammen, s-ino, Grenaa,	d. Kr.	25.—
Hirsch, f-ino, Burgfarnbach,	gmk.	100.—
Weisbart, s-o, Nürnberg,	gmk.	50.—
Doerfler, s-o, Mühldorf a. L.,	gmk.	100.—
Essigman, s-o, Varsovio,	gmk.	600.—
Obermaier, s-o, Gronsdorf,	gmk.	25.—
Holmes, s-o, Shipley,	sh.	5.—
Patzschke, s-o, Fürth i. B.,	gmk.	50.—
Pflaier, s-ino, Nürnberg,	gmk.	800.—
Seeberger, s-o, Bayreuth,	gmk.	100.—
Bünemann, s-o, Hamburg,	gmk.	100.—
Leitl, s-o, Waging/Otting,	gmk.	50.—
Schade, s-o, Wien,	gmk.	500.—
Barkhausen, s-o, Bremen,	gmk.	25.—
Keller, s-o, Bremen,	gmk.	25.—
Schade, s-o, Wien,	aŭ. Kr.	10.000.—
„Nova Tempo“, Wien,	aŭ. Kr.	20.000.—
Roboz, s-o, Budapest,	gmk.	50.—
Szasz, s-o, Budapest,	gmk.	50.—
„Mondamiko“,	gmk.	12.000.—
Haidel, s-o, Graz,	aŭ. Kr.	3000.—

intelekta agado. La arto kaj la belaj ideoj trovas labor-eblecojn en la foira sfero spite la komerca karaktero. La foiroj estas instruoj por la publiko kiu ilin vizitas. Kun intereso la publiko seĉas la novaĵojn kiuj elzistas inter la limoj de la foira tereno, jen ĝi trovas fragmentojn de la universala ekonomio, kies tendencojn ĝi devas sekvi por ne suferi malavantaĝojn. Jen la ĉiama, facilanima skeptikeco por momento silentas, ĉar ĝi povas nur vidi pozitivajn rezultojn, subtenataj de la aŭtoritato de la foira administraco. Unuvorte, foiroj estas kompasoj kaj helico de la ŝtata ekonomio.

Kun granda koincido de la komunintereso la lingvo internacia povas peri en la mezo de la foira merkato, ne kiel uzo de ĉiuj, sed kiel uzeb'la esprimilo proponita de larĝvida administraco de la foira Babilono. En la foira sfero Esperanto devas trairi brulprovon. Parte ĝi iam flon faris, ĉar dekdu foiroj donis al ĝi oficialan subtenon. Du internaciaj konferencoj de foiroj oficiale kunvenis por decidi pri favora rilato al Esperanto. Esperanto estas uzata en la foiraj katalogoj! Dank' al aŭtoritatoj kaj klera protekto de foiraj administracoj la Esperantistoj sukcesis malfirmi novan vojon al serioza menso de la publiko, ĉar centmiloj da homoj, sur la tereno de foiroj regule kontaktas kun Esperanto, vidas ĝin uzata, esprimriĉa kaj fleksebla.

Samideanoj! La verda folio de la paco ornamas la bastonon de Merkurio. Ni povas batali pace kun nia afabia malamiko, komercisto, kiu ĝis nun konsideris nin sensecaj utopistoj. Lin ni rekonas.

La komercisto ne ĉiam estas la avara profitemulo. Plej ofte li estas multflanke klara, eĉ idealista homo. Nur lia ekscitema kaj konsideriga pozicio en la socio igas la komerciston suspektema, kaj certe danĝera por lia kredito estas tro frua elektivigo de ideoj, kiuj ne jam donis sufiĉe da rezultoj konvinkaj por kiu ajn, ĉar li devas sin okupi nur kun faktoj. Malofte li povas ludi rolon de pioniro, kaj cetera la lia opinio estas sub sama influo kiel tiu de aliaj homoj. Tiel ni devas kompreni la suspektemon de la komercista mondo, de nonstracie havigante al ĝi realaĵojn, en kio nin subtenas la foiroj.

Jen kiel ĝis plue la valora subteno de la foiroj povas sin esprimi nur en la porfoira reklamo, kiu cetero por la komercistoj estas preskaŭ ĉio en ĉio. En la reklamado la por- kaj peresperanta reklamo koincidas. La Esperantistoj ne plengras la mondon, sed ili estas sufiĉe multaj por povi sukcesi la sondantan reklamon de la foiroj, ĉu subtenante la serveman centron (UEA), ĉu persone perante al la naciaj gazetoj per Esperanto ricevitan informojn. Leuziga, Frankfurt kaj Finnlanda foiroj plej laste eldonis lukseajn publikadojn en Esperanto kun dezire ke ili povu irpenetri la barojn de la multlingveco, kiu ĉie troŝarĝas la buĝeton de foiroj. Jen ni havas okazon kaj devas montri la uzeblecon de nia lingvo.

Samideanoj! La Universala Esperanto Asocio kunvokas la 28. 3. — 4. 4. 1923 Komercistan kaj Turistan Konferencon en Venecio. La konferenco farigis tria kvinonda atesto por Esperanto en nia plej proksima sfero, eĉ, ĝi streĉegas la fortojn de ĉiuj Esperantaj foiristoj kiuj laboras en mezo de la plej postulema ĉirkaŭo kaj kies peresperanta propagando celas pilgrevigi la aŭtoritaton de la Venecia konferenco.

Okupu vin pri ilia propagando. Havigu al nia zorgato videblan pozicion.

Konrad Ojala,
Esperanta sekretario de Finnlanda Foiro.

La grupo havas novajn ejojn en l' Ecole Spéciale de Travaux Publics (Speciala lernejo de publikaj laboroj), 3 rue Thénard. — La 7. nov. parolado de s-o Chavet pri la XIV-a. — La 30. nov. parolado de s-o Lefevre en la unuigo de librotenistoj de departemento Seine pri Esp. kaj komerco.

En Orléans restariĝis la Federacio de Centro-okcidenta Francujo. Aliĝis la grupoj de Le Mans, La flèche, kaj Montargis.

En Meaux 18. nov. sukcesa parolado de s-o Coueaux en la popola Universitato.

En Châlons-sur-Saône 2 kursoj de s-o Pion en la urbodomo.

En Reims starigis nova regiona federacio Nord-orienta.

En Marseille estas fondita la „Mediterranea Esperantista Federacio“, kiu nun konsistas el ok grupoj: Perpignan (Pyrénées-Orientales), Béziers, Cette, Montpellier (Hérault), Aramon (Gard), Avignon (Vaucluse), Marseille (Bouches-du-Rhône), Toulon (Alpes-Maritimes).

Jam ĝi vige laboras, por ke aliĝu la grupoj ekzistantaj en la regiono, por restarigi la antaŭmilitajn kaj starigi novajn.

Ĝia 1-a Ĝenerala Kunveno okazos en Marseille la 1. kaj 2. aprilo 1923 (Paskajn tagojn). Por allogi eksterregionajn kaj eksterlandajn gesamideanojn, estas preparataj brilaj festoj, tutfaga ekskurso ktp.

Roksano varmkore dankas ĉiujn gesamideanojn, kiuj laŭde skribis al ŝi pri la Esperanto-Hejmo, post ĝia apero sur nia ET. Tiel multaj ili estas, ke ŝi tute ne povas — kun profunda bedaŭro — respondi al ĉiu.

En Beziere dum la Ĝenerala kunveno de „Beziers Stelo“ ĝiaj anoj unuvce elektis kiel prezidanton: Rolenton (Laurent Bergit), kiel sekretario: Johanon Flottes, 1, rue Meyerbeer.

Dank' al klopodoj de s-o Fize (unu el la fondintoj de Beziers Stelo) la urbestro disponigis al la grupo ĉambregon por kursoj kaj kunvenoj. La kursoj komenciĝos dum januaro.

La 15-a de decembro estis solenata.

En Perpignan 3 Esperantaj kursoj okazas ĉiusemajne sub la protekto de la Politeknika Asocio.

Aŭstrio.

En Wien 10-jara fondiĝfesto de la Esp. grupo „Verda Stelo“ en la katolika submajstra unuigo la 15. okt. okazis Esp. Diservo kaj sekvis festkunveno.

Esperanto en Ruslando.

Oni informas nin el Petrograd, ke la nuna adreso de la Petrograda Societo Esperantista „Espero“ estas: Italianskaja 31. Nia bildo en n-o 107, pĝ. 3. montras la sidejon antaŭan de la Societo ĉe strato Preobrajenskaja. S-o Pilev nun jam ne estas prezidanto de la societo.

Al ĉiuj Belgaj Katolikoj Esperantistoj!

Por grupigi la katolikajn Esperantistojn kaj la malnovajn membrojn de la antaŭa Belga Katolika Esperantista Ligo la interesigantoj estas petataj sin turni al la provizora sekretario kaj sendi siajn eventualajn proponojn pri restarigo de tiu Ligo. Ni estus feliĉaj koni la nuntempajn adresojn de la antaŭa komitato.

Fino Jeanne Assenmacher,
50, Rue des Minières, Verviers, Belgulo.

Internacia Kontraŭmilita Ekspozicio

okazis en la komenco de decembro en Amsterdam. Esperanto estis reprezentata per du standoj de la Ned. Federacio de Lab. Esperantistoj. S-o Kloeck paroladis pri Esp. kiel rimedo por interkomprenigi la laboristojn por forigi la militon. Al ĉiu vizitanto estis donata flugfolio pri Esp. kaj la paca movado.

Materjalon por la ekspozicio ni ricevis de: P. Balkányi, Budapest; E. Adamson, Gefle; Roskes Dirksen, den Haag; R. Reeh, Trautenu; B. Halbritter, München. Al ĉiuj nian koran dankon.
Ned. Lab. Esp. Servo.

Komerco.

La ŝirmo Dr. A. Wander S. A. en Bern (Svislando), posedas ankoraŭ malgrandan provizon de siaj broŝuroj en Esperanto pri „Ovomaltine“, fortiga nutraĵo. Esperantistoj postulu ĝin!

Esperanto inter fervojistoj.

Post la policanoj kaj tramvojoj Esperanto disvastiĝas nun ankaŭ inter la fervojistaro de Wien. En la okcidenta stacidomo komenciĝis granda kurso, kiu havis la sukceson, ke 40 kursoj decidis fondi fervojistan societon. Prepara komitato estas jam elektita kaj klopodas nun konatiĝi kun la eksterlanda Esperantistaro kaj petas alskribojn al la adreso: Esperantista societo de fervojistoj, Wien XIV, Westbahn-Werkstätte, Avedikstrasse 2.

Esperanto en Germanlando.

En Düsseldorf okazos la 13. januaro 1923 (sabato) je la 8-a horo vespere en aŭlo de Lessing-Oberrealschule, Ellerstrato (10 min. de la ĉefa stacidomo) Esperanta koncertvespero, konsistanta el prezentaĵoj nur en Esperanto: deklamoj, kantoj (i. a. de Brahms), instrumenta muziko. Ĉiuj samideanoj kaj amikoj de Esperanto estas bonvenaj.

Por malsatantaj rusoj

mi ricevis poŝmarkojn de: Osmond, Hennsey Rise; nekona samideano el Scheveningen; N. Boon, Den Haag (tre valora kolekto kaj unu guldeno); J. P. Klerke, Edmond Hoef; G. Scheuwink, Enschede; J. Tuin, Haarlem. Koran dankon al ĉiuj. Pliaj sendaĵoj estos bonvenaj.

G. P. de Bruin, Alleeweg 9, Enschede.

Diversaĵoj.

Ĉu tri vicoj aŭ du. — Studo pri laborhoroj.

Klariganta volumo pri la rezultoj de la ŝanĝo el poŝdeku horoj duvica sistemo al poŝo horoj trivica sistemo ĉe la fera kaj ŝtala industrio ĵus eldonis la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj en Genève.

La enketo estas entreprenita sugestie de la Taylora Societo de Usono, organizajo konsistanta el inĝenieroj, direktantoj de produkto kaj direktantoj de laboro sin interesantaj pri efikeco ĉe industrio. La Internacia Labora Oficejo sendis demandaron al la Registaroj de la ŝtatoj, membroj de la Internacia Labora Organizajo kaj al reprezentataj mastraj kaj laboristaj asocioj en la celo havigi el diversaj landoj difinitajn pruvojn pri la efiko de la ŝanĝo sur la produkto, sur la kosto por unuo, kaj sur la sano de la laboristoj. La respondoj estas aldonitaj plene, aranĝitaj laŭ lando aŭ sub ĉiu demando.

La poŝo horoj trivica sistemo estas postmilita fenomeno en Eŭropo. Antaŭ la milito ĝi ekzistis nur ĉe iuj britaj firmoj, sed en 1919 ĝi etendiĝis tra tuta Eŭropo. Ne estas eble dedukti difinitajn konkludojn pri produkto aŭ kosto el la ricevitaj respondoj, ne nur tial, ke la aliĝinta ekonomia situacio tre malfaciligas komparon. La akiritaj informoj tamen posedas grandan valoron kiel bazo por studado de la demando.

Rilate al la efikoj de la sistemo sur la sano de la laboristoj, estas ankaŭ tro frue por ĵui.

Ekzistas pruvoj pri malpligrandiĝo je oficeo de akcidentoj en Aŭstrujo, Germanujo, Italujo (malgranda) kaj Polujo, sed unu Finnlanda firma asertas 50-procentan pligrandiĝon, kaj, el la hispanaj firmoj, unu asertas malpligrandiĝon kaj kvar pligrandiĝon.



Esperanto inter tramistoj.
La Rheinland'aj samideanoj jam preparas sin por akcepti la fremdulojn, kiuj dum la vojaĝo al Nürnberg trapasos Rheinland'on. Por la trafiko estas grave, ke olficistoj de fervojoj, tramvojoj kaj aliaj publikaj institucioj scipovos Esperanton.

La libro, kies titolo estas »Apliko de la trivica sistemo al la Fera kaj Ŝtala Industrio«, konsistigas tre utilan kaj valoran enkondukon al tiu ĉi grava temo.

Internacia Labora Oficejo.

Parolejo.

Preseraroj.

En mia respondo (Parolejo n-o 141) troviĝas kelkaj preseraroj. Bedaŭrinde, pro troa elia okupateco, mi ne plu povas mem legi la presprovaĵojn de ET; pro tio mi petas pardonon, se foje restas preseraroj. Oni bonvolu korekti: linio 7 (post „malbonajn“ devas sekvi la vorto „librojn“), linio 25 (anst. „larĝanimo“ leĝu „larĝanmecc“), en kolumno 4, linio 2 (leĝu „viviklo“ anst. „vivikalo“), linio 4 („nia“ anst. „nia“). (T. J.)

145. Rilate al 140.

Kial malesimi la homan korpon? Estus pli bone se ni pli pensus pri ĝi. Eble tiam ni klopodus forigi ĉian malfaŭgan laboron kiu malbeligas ĝin, kaj ĉesus ĉian kulmon kiu difektas aŭ malfortigas ĝin. La angla vorto „upright“ signifas ne nur rektan korpon, sed honorindan, honestan karakteron. Tio montras, ke estas konstatite, ke korpa stato influas la menson. Ni do klopodu, ke la korpo estu iu'ga videbla signo de bela, pura animo.
Emma L. Osmond, London.

146. Protesto de Ĝenerala Direktoro de Latvia Fervoja Diko.

Mirindaĵ estas la geografiaj scioj de miaj kolegoj en Okcidento. Kvankam mi sendis precizajn adresojn kaj rangonmojn de laŭval samideanoj al redakcio de „La Pollicisto“, la kolegoj en Dresden, Wiesbaden kaj aliaj elektas min „polica prefekto“ kaj eĉ ne en mia petolando sed en Litovio, kies civitano mi tute ne estas, kvankam ĝi estas parenca popolo (kiel aŭdoj rilate al danoj). Ili skribas „polica prefekto“ kaj „Litovio, Riga“, fordonante tiunmaniere la laŭval ĉefurbon al Litovio. Same la kolegoj en Leiden (Holando) nomas min „Litovuj polica prefekto“, „Ruslanda Randŝtato — Riga“ — do, ankoraŭ pli bone — ili fordonas alian petolandon kaj same Litovion al ilia Komunist Internacio, farante alian london „Ruslanda Randŝtato“. Pri tio mi ofendiĝas kaj laŭvoĉe protestas: nek mi kara patrujo Litovio, nek mi havas ion komunan kun komunista Ruslando-Sovdepo. Leterojn kun tia ofenda adreso mi estonice ĵetos en paperkorbon.

Tio estas pri la adresoj. La enhavo de la leteroj estas abolute kontraŭa — oni tie min honoras, salutas, kaj eĉ gratulas pro mia „konstanta kunlaboro kaj fide disvolvigo de police Esperante movado“ — ĉi tiu trohonorita min korusis — por ĝi mi kore dankas kaj petas pardonon pri la antaŭaj averaj vortoj.

Felice novan jaron deziras al la salutintaj lin kolegoj:
Latvijas dzelzeli Grigaroviĉ,
Polizijas Preekachneeks: Ĝenerala Direktoro de la Fervoja Ordo.

Latvio, Riga, la 22-an de decembro 1922.

Leterkesto de ET.

E. S. P. en Boston. — Kial vi sendas ĉekon anstataŭ ŝtatan monbileton en registrita letero? Vi kaj ni profitus!
R. O. en Saseno. — Decido pri akcepto aŭ neakcepto de ricevita manuskriptoj ne tuj estas donebla. Atentu daŭre la rubrikon. Ne akceptitajn manuskriptojn vi povas uzi por alia gazeto.

V. E. en Ronaperg kaj aliaj. — Ni ne povas respondi al ĉiuj, kiuj demandas pri adresoj de gazetoj ktp. Bonvolu ne forgesi ke UEA ekzistas por tiaj aferoj. Ĝia jarlbro enhavas deziritajn informojn.

A. H. en Håstveda. — Dankon por varbado. Via abono daŭras nun ĝis 165.

K. A. V. en Wien. Pri la sorto de via manuskripto decidis Zancni. Pli mallongajn ni preferus. Vi povas skribi sur ĉia papero. Ĉefa afero estas unuflanke kaj bone legeble. Pri la vortaro bonvolu turni vin al Hirt & Sohn en Leipzig.

J. Ĉ. en Plzen. — Vi ricevis jam 8 n ojn post fino de via abono; do restas de 12 kr. senditaj nur 2.40 kr., kio ne sufiĉas por anonco. Ni do liveros ET ĝis 119 kaj konsilas esprimi vian dankon per poŝmarko al s-o P.

Nekrologo.

En Barnaŭl, Altaja Gubernio, mortis 25. novembro 1922 de tifo post longa turmenta malsano malnova fervorega Esperantisto, Prezidanto de loka Esperantista grupo

V. K. Tenisov.

Tenisov estis 50-jara kaj 29-jarojn Esperantisto. Li loĝis en multaj urboj kaj urbetoj de Ruslando: Odesa, Moskva, Nijnij Habarovsk, Blagovesĉensk, Sretensk, Nikolajev sur Amur, Vladivostok, Petrograd, Omsk kaj Barnaŭl, kaj ĉie li estis organizanto de Esperantaj grupoj, kuirsoj ktp. Li havis grandegan korespondadon kun/ alilandaj samideanoj, kaj ĉiujn siajn rimezojn oferis por tiu ĉi korespondado kaj kolektado de markoj, ĉar li ankaŭ estis filatelisto. Post li tute sen rimezoj restis lia malsana edzino kaj du filoj.

A. S. P., Barnaŭl,
Altaja Gubernio,
Pavlovskaja 23.

Zoubek, s-o, Wien,	aŭ. Kr.	7500.—
D-ro Kaspar, s-o, Eibiswald,	gmk.	500.—
Hell, s-o, Eger,	ĉ. Kr.	40.—
Deistler, s-o, Wien,	aŭ. Kr.	5000.—
Them, f-ino, Wien,	aŭ. Kr.	5000.—
Braun, s-o, Wien,	aŭ. Kr.	1250.—
Heineck, f-ino, Dresden,	gmk.	200.—
P. G., s-o, Hamburg,	gmk.	100.—
Esperantogrupo Roth b. Nbg.	gmk.	25.—
Ritter, s-o, Waldsaasen,	gmk.	100.—
Puntigam, s-o, Leoben,	aŭ. Kr.	6000.—
Puntigam, s-o, Leoben,	p. M.	1.50
Schünemann, s-o, Harburg,	gmk.	50.—
Pfohl, s-o, Hamburg,	gmk.	150.—
Esp. Societo „Danubio“ Wien,	gmk.	500.—
Esp. Junularo, Wien,	gmk.	700.—
Esp. Kursanoj, Wien,	gmk.	500.—
Schumm, s-o, Schweinfurt,	gmk.	100.—
Ravestain, s-o, s-Gravenhage,	hfl.	2.50
Schneidmüller, s-o, Quedlinburg,	gmk.	100.—
latel, s-o, Wiesbaden,	gmk.	200.—
Kursanoj, Ostrau,	ĉ. Kr.	112.—
Kröber, s-o, Glaubitz,	gmk.	100.—
Kupfer, f-ino, Stettin,	gmk.	100.—
D-ro Steche, s-o, Leipzig,	gmk.	1000.—
Rossmannth s-o kaj kursparto-	gmk.	6500.—
prenantoj, M. Ostrau,	aŭ. Kr.	22 500.—
11 aŭstroj,	gmk.	100.—
Reuss, s-o, Essen,	gmk.	100.—
Sperling, f-ino, Leipzig,	gmk.	100.—
Stephan, s-o, Neustadt O/S,	gmk.	100.—
Scheiber, s-o, München,	gmk.	100.—
May, s-o, Illingen,	gmk.	400.—
Ebert, s-o, Lengenfeld I/V.,	gmk.	100.—
Kobylnski, s-o, Katowice,	gmk.	300.—
Lintl, s-o, Pfakofen,	gmk.	50.—
Thiébault, s-o, Carignan,	f. fr.	50.—
Donien, s-o, Friedrichshah,	gmk.	200.—
Weinsberg, s-ino, Kraków,	gmk.	200.—
Pfanner, s-o, Hannover,	gmk.	1000.—
Ellersiek, s-o, Berlin,	gmk.	600.—
Atanasov, s-o, Halle a/S,	gmk.	50.—
Brockmann, s-o, Uerdingen,	gmk.	100.—
Bartzach, s-o, Leipzig,	gmk.	50.—
Kochmann, s-o, Wien,	gmk.	174.—
Grube, s-o, Harburg a/E,	gmk.	200.—
Paradistal, s-o, Varsovio,	pmk.	500.—
Büttner, s-o, Meissen,	gmk.	50.—

Procházka, s-o, Odrlice,	ĉ. Kr.	10.—
Gawantka, s-o, Hamburg,	gmk.	100.—
Koopman, s-o, Haag,	hfl.	1.50
Brieger, s-o, Breslau,	gmk.	200.—
Ehm, s-o, Zittau,	gmk.	100.—
Esperanto Klubo, Pĥivoz,	gmk.	5000.—
Cremer, s-o, Benrath a/Rh.,	gmk.	50.—
Mollenhauer, s-o, Essen,	gmk.	50.—
Steiner, s-o, Győr,	gmk.	100.—
Berán, s-o, Győr,	gmk.	100.—
Weisbart, f-ino, Nürnberg,	gmk.	50.—
Frymer, f-ino, Łódź,	gmk.	1000.—
ne nomita,	gmk.	500.—
Degen, s-o, Rathakirchen a/Rh.	gmk.	50.—
Kreutz, s-o, Aachen,	gmk.	50.—
Pridot, s-o, Potsdam,	gmk.	100.—
Sösa, s-o, Wien,	gmk.	100.—
Nagel, s-o, Eisenach,	gmk.	100.—
Weimert, s-o, Eisenach,	gmk.	100.—

Literaturaj Manuskriptoj.

Ricevitaj:

304. Hinda fabelo (Heyting). 305. La kanto pri la tabakpipo (Fr. S.). 306. Vespero (Fr. S.). 307. Je memoro al nia kara Majsiro (A. T.). 308. Unuformeco (Toth). 309. Humoro (Kal-Mano). 310. La Kristnasko de la bovoj (sendinto?). 311. El mole rachim (Gomullick). 312. La Margreiter Franzl (Fraungruber). 313. En malproksimo (Flam vana). 314. Klon faras la ciklonio? (Kistaludi Károly). 315. Al la homaro (V. Pf.). 316. Mia dometo (V. Pf.). 317. Saluto al Nürnberg (V. Pf.). 318. Esperantujo (V. Pf.). 319. Senverigita plano (Peißl). 320. La frosto venkis (T. S.). 321. En vagono (T. S.). 322. Ekzameno (I. Z.). 323. La luno rakontas (Perec). 324. La filatelistoj (Averĉenko).

Akceptitaj:

185, 186, 187, 189, 190, 192, 195, 233, 292.

Ne akceptitaj:

184, 186 a, b, 188, 191, 194, 244, 245, 291 (tro malltue).

Sendintoj de literaturaj manuskriptoj bonvolu ĉiam atenti ĉi tiun rubrikon.

Vintra espero.

Malaperis la printempo,
La aŭtuno, la somero
En la ondoj de la vasta
Kaj malluma temprivero.

La printempo ornamadis
Per folioj la branĉaron;
La somera brila suno
Orumadis la kamparon;

La aŭtuno kreis lerte
Simfioniojn per koloro;
Neniĝis ilin ĉiujn
De la vintro la fervoro.

Jen, nun staras senfolia
La belega montarbaro,
Kaj per neĝa mortotuko
Nun kovriĝas la kamparo.

Peze premas la nebulo
La montaron kaj la valon,
Nur malofte pala suno
Trapeneiras la vualon.

La riverojn kaj la fontojn
Glaciigis frostoforta,
Kaj en la naturo ŝajnas
Ĉiu vivo tute morta.

Tamen en la homa koro
Ĉiam diras la espero:
Ja revenos la printempo,
La aŭtuno, la somero!

Originale verkis Altenberg.

Else Martini
Walter Ranft
gefiandoj

Dresden, Kristfestoj 1922.

FOTO APARATO

9x12 kun objektivo
„Ernar“ (tre lumforta)
kun kompura kaj fend-
fermilo ĝis 1/1000 sek.
Prezo: 1600.— finnaj
markoj. — Proponoj al

Esperanto Komercista Grupo
Dresden-N, Hauptstrasse 38, Germani.

SUDGERMANA ESPERANTO-ELDONEJO

OSKAR ZIEGLER, DEISENHOFEN B. MÜNCHEN

liveras krom
propraj eldonaĵoj,
tuj ĉiujn aliajn Esperant-
aĵojn je plej bonaj
kondiĉoj.

POSTULU PREZPROPOŬOJN!

LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAŬE HENRI J. CARELS.

50 BUTIKOJ:	LUNĈEJO	DEN HAAG,
DEN HAAG:	CARELS	65 WEIMAR-
HAARLEM:	(ĈEFO:	STRAAT.
AMSTER-	H. A. SCHAR-	ONI PARO-
DAM.	WÄCHTER.)	LAS ESPER-
		ANTON.

„Chwoika's Pilsner Bierstuben“

Pilsen-Biertrinkejoj de Chwoika

Karlsbad (Ĉeĥoslovakio), Hauptstrasse,
Domo „Engländer“. — Renkontejoj de
la kuracgastoj kaj pasantoj.

Anonceloj.

Familiaj anonceloj senpage. Aliaj anonceloj (nur akceptataj por minimume du alnekvaj enprezoj) kostaĵo po 30 vortoj (krom unu adreso) 0,20 dol., 0,40 jeno, 0,50 ĥil., 1 nord. kr., 1 ĥil., 1 avia. fr., 1 pes., 1 litr., 2 franc. aŭ belg. fr., 2 esk., 5 lir., 6 k., 7 mk., 10 din., 18 lei, 18 lev., 600 gmk., 200 hung. kr., 1000 pmk., 5000 austr. kr. Ĉiu povas pagi per unu aĵo el la nomitaj valutoj, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 cent. resp. kup. Anonceloj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fr. Ĉe rektaj anonceloj ni deprenas laŭ pagon „ar anonceloj laŭ dezire de la abonanto, de aliaj ni deprenas anoncelojn nur post antaŭpago. Anonceloj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

Bonvalutlandaj gesamideanoj! Junulo, lernanto de mez-
lernejo, en tre malfacila situacio, petas donaci aŭ prunti
25 dol. aŭ 10 sterlingojn por vivrimedo. Helpu gesam-
ideanoj! Ebligu al mi fini la kurson. Oferto sub „Helpu“
al „Esp. Trimf.“ en Horrem ĉe Köln

Holandanoj! Fratlo, 24-jara, printempe nepre volas vojaĝi
en Holandon, tial petas la gesamideanojn, akiri por li
iun ajn laboron, el kiu oni povas vivi kaj edziĝi, nature
kun holanda knabino. Adreso: Racsmány Dezső en
Budapest VII, Czobor u. 124 (hungaruj).

Al memoro de Peiŝi, la fama poeto, estas dediĉita parto
de la kristnaska numero de „Literatura Mondo“, ilustrita
riĉenhava, unika en Esp. gazetaro. Meudu ĝin tuj! Por
ne abonantoj nur kelkaj numeroj rezervitaj! Eldonejo:
Budapest VI, Aradstr. 81. Prezo 1 av. fr. aŭ egal-
valoron.

Bulgara Rozoleo, pura unuskvalita, en boteloj po 5 gr.
15 fr. fr., 60 gr. 145 fr. fr. R. Cervenakov, en Sofio, str.
Krazev 27 (Bulgarujo).

ĈIUSPECAJN TRIKAJOJN, speciale aritrikaĵojn faras blind-
ulinoj el nia Bilindula Esp. Grupo. Ni petas multajn
mendojn! Adr.: Anna Filbrich, Erfurt, Wendenstr. 16,
Germanujo.

KONTRAŬ 10 fr. aŭ be'g. fr. mi sendas rekomendite 100
diversajn bulg. rojn poŝtmarkojn (malnovajn, jubileajn
kaj militajn) korespondajn germ., france, Esp. S-o
Théodor Theodoroff, telegrafisto, Pleven, Bulgarujo.

HIERUGIA by D. Ruck D. D. 1851, anglalingva, riĉe ilustrita,
568-paĝa,
Michel kaj Sent, poŝtmarkajn katalogojn, prezsciigo
kontraŭ respondkarto,
Helponbiletojn Stuttgartajn, serio 16-pecaj, por 1 dolaro
aŭ io alia. S-o Hans Böning, Stuttgart, Libanonstr. 45,
Germanujo.

BONA EDUKADO en superrealternejo germana — prec.
instruataj franca, angla (laŭvole latina) lingvoj, natur-
scienco, matematiko — laŭ plej modernaj principoj
insaliva kaj gvidata kosto kun bona pensio nur
bagatelo al eksterl. Detalojn petu de Prof. Dr. Döhler
Riesa, Germani.

TAGLIBRO DE VILAĜPEDELO

Interesa romansimila rakonto de la dana
verkisto Bilcher, tradukita de s-o Bul-
huils, L.K.-ano. Rekomendita de Esper-
antista Literatura Asocio.

Prezo (inkluzive sendkosto)
por malbonvalutuloj 480.— gmk.
por mezbonvalutuloj 780.— gmk.
por bonvalutuloj 960.— gmk.

Butin & Jung, Godesberg (Germ.)
Esperanto-Eldonejo Bahnhofstr. 30
Postĉeka konto Köln 92036.

LA TRIUMFO DE ESPERANTO

Gramatika Praktiko

Flandra kaj franca, de L. Varendonck

Prezo: 5.15 ĥk. enlande
5.50 ĥk. eksterlande
Rabato ĉe granda mendo.

Eldonis:

„La Taglibro“, Posthornstr. 14, Ledeborg (Belg.)



Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien III, Postamt 24.
Belgia: Frans Schoofs, 45, Kl. Beersstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 2000.
Brazilia: Brazila Ligo Esperantista, Praça 16 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgij Ĥr. Gebeŝki, Bul. Maria Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovaka: Otto Škrlentka, Hradec Králové; Otto Lumpe, Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unio, poŝtkaŭto 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B, Kasarminkatu 3, Helsinki.
Franca: Esp. Centre Librejo, 51 rue de Cligny, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldea de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalun.
Hungara: Páló Balkányi, Hajo-utca 15-11-2, Budapest VI.
Itala: Itala Esperantista Federacio, Casella Postale 25, Verona.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamachi, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruŝi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latvia: Talivaldo Indra, Riga, Pasa kaŝe 475.
Litova: Páló v. Medem, Smeliu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestein jr., v. Aerensstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝt-
ĉeka konto Haag n-o 2076.)
Pola: Adolfo Oberholman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 2125).
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esp.-Centro Rumana, Bucuresti, Alea Suter, 19.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtĉeka n-o 620.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
Svisa: Esp. Librejo „Verda Stelo“, Rosenheimstr. 5, St. Gallen-Ost.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, Box 52, Weehawken N.

Kongresanoj por la XV-a.

191. Hörtenhuber Hans Salzburg.
192. Ehart Zäcilie, s-ino, Salzburg.
193. Tannenbaum David, Wien.
194. Braun Franz, Wien.
195. Deistler Andreo, Wien.
196. Them Berta, f-ino, Wien.
197. Hell Karl, Eger.
198. Hell Tina, s-ino, Eger.
199. Ziegler Christian, Deisenhofen/München.
200. Ziegler Oskar, Deisenhofen/München.
201. Kuhnhardt F., München
202. Bálková Štěpána, f-ino, Praha-Žižkov.
203. Funken Leono, Koblenz/Rh.
204. Lorenz Heinrich, Koblenz/Rh.
205. Stroh Emilio, Koblenz/Rh.
206. Wahl Lorenz, Arzheim b. Kobl.
207. Heineck Lisa, f-ino, Dresden
208. Thalmeier Korbinian, Otting/Waging.
209. Wagner Rienhold, Lodz.
210. Baumgärtel Herbert, Auerbach i/V.
211. Fink Gerda, f-ino, Auerbach i/V.
212. Jungk Elisabeth, f-ino, Elfeld i/V.
213. Hasenclever Paul, Auerbach i/V.
214. Kreyssig Friedrich, Schreiersgrün/V.
215. Gottgeireu Paul, Hannover.
216. Gottgeireu Clara, s-ino, Hannover.
217. Scholz Erwin, Haindorf.
218. D-ro Adam Adolf, Erlangen.
219. Lucas Fritz, Bad Homburg v. d. H.
220. Lucas, s-ino, Bad Homburg v. d. H.
221. Braun Bernhard, Bin, Baumschulenweg.
222. Pillar Grace Vernon, f-ino, London.
223. Johns Rachel Hesler, f-ino, London.
224. Anofrijev Vadim, Elva.
225. Butin Max, Godesberg a/Rh.
226. Butin Maria, s-ino, Godesberg a/Rh.
227. Stern Dezső, Breslau.
228. Stern Alexander, Breslau.
229. Ritter Jakob, Waldsaasen.
230. D-ro Fiby Heinz, Graz.
231. Fiby Marike, s-ino, Graz.
232. Puntigam, Hans, Leoben.
233. Puntigam Anna, s-ino, Leoben.
234. Bartel Karl, Graz.
235. Bartel Anna, s-ino, Graz.
236. Schumm Jakob, Schweinfurt.
237. Halmel Josef, Leipzig.
238. Goldbach Franz, Memmingen.
239. Weinsberg Regina, s-ino, Kraków.
240. Srebua Luisa, s-ino, Kraków.
241. Schleickhorn Leon, Kraków.
242. Rubinstein Israels, Kraków.
243. Rykate Tadeus, Kraków.
244. Kuhl Bronislaw, Kraków.
245. D-ro Blassberg Maksymilian, Kraków.
246. Schlunemann Heinrich, Harburg Elbe.
247. Schlunemann Helene, s-ino, Harburg/Elbe.
248. Stingimayer Mizzi, f-ino, Salzburg.
249. Pfohi Oskar, Hamburg.
250. Kreibich Emil, Kladno.
251. Kreibich Vilma, s-ino, Kladno.
252. Weltzmann Max, Oederan.
253. Wüster Eugen, Berlin-Charlottenburg.
254. Steiner Marie, s-ino, Bisamberg/Wien.
255. Steiner Hugo, Bisamberg/Wien.
256. Steiner Lothar, Bisamberg/Wien.
257. Steiner Hugo, Bisamberg.
258. Wolfertz Hermann, Menzelen.
259. D-ro Wicke Fritz, Chemnitz-Gagienz.
260. Markuse Vladimir, Berlin.
261. Reháč Franz, Wien.
262. Schmied Adele, f-ino, Wien.
263. Schmied Johann, Wien.
264. Valenta Ludwig, Wien.
265. Hacker Ida, s-ino, Wien.
266. Spira Harry, Wien.
267. Donath Philipp, Wien.
268. Dwořák Herma, f-ino, Wien.
269. Freund Elise, f-ino, Wien.
270. Zimmer Julia, f-ino, Wien.
271. Ullmann Max, Wien.
272. Kozina Karl, Wien.
273. Hinterberger Káthel, s-ino, Wien.
274. Hinterberger Franz, Wien.
275. Klima Adrienne, f-ino, Wien.
276. Pany Polixenia, f-ino, Wien.
277. Selzer Bernhard, Wien.
278. Grossberg Norbert, Wien.
279. Lipphardt Severin, Wien.
280. Anders Marie, s-ino, Wien.
281. Schicketanz Ricci, f-ino, Wien.
282. Popper Oskar, Wien.

283. D-ro Jokl Hugo, Wien.
284. Čech Rajmund, Wien.
285. Hlaváč Johano, Wien.
286. D-ro Pfeffer Emil, Wien.
287. Sonnenfeld Ernst, Wien.
288. Vasta Franz, Wien.
289. Spire Alexander, Wien.
290. Schamanek Josefo, Wien.
291. Metzker Marha, f-ino, Wien.
292. Feih Siegfried, Wien.
293. Kolhofer Josef, Wien.
294. Metzker Irma, s-ino, Wien.
295. Weininger Josef, Wien.
296. Mildwurf Adolf, Wien.
297. Klánil Vojtěch, Wien.
298. Langer Vojtěch, Wien.
299. Sikor Karl, Wien.
300. Panchartek Antonin, Wien.
301. John Karl, Oederan.
302. John Felix, Oederan.
303. Tauscher Martin, Oederan.
304. Weber Gustav, Wien.
305. Dittich Maria, f-ino, Wien.
306. Wieland Michael, Horrem b. Köln
307. Bueeth R., Leipzig.
308. Buseth Jenny, s-ino, Leipzig.
309. Glas Käthel, f-ino, Horrem b. Köln.
310. Weidner Erich, Eisenach.
311. Weidner Gertrud, s-ino, Eisenach.
312. Böhm Daniel, Czesochowa.
313. Post Heinrich, Zdringhausen.
314. Kröber Karl, Glausbus-Riesa.
315. Ravestein Jozef, 's-Gravenhage.
316. Ravestein Jeanette Marie, s-ino, 's-Gravenhage.
317. Schönemann Otto, Graz.
318. Fleischmann Grete, f-ino, Graz.
319. Lenker Maria, f-ino, Leoben.
320. Lenker Dora, Leoben.
321. Lenker Marha, f-ino, Leoben.
322. Barth Walther, Rabenstein.
323. Reimer Johannes, Rabenstein.
324. Hübner Paul, Quedlinburg.
325. Hübner, s-ino, Quedlinburg.
326. Schneidmüller Ernst, Friedrichsthal, .
327. Isiel Ludwig, Wiesbaden.
328. Isiel Sofie, s-ino, Wiesbaden.
329. D-ro Christianell Franz, Salzburg.
330. Benluch Franz, Ostrau.
331. Dalmau Delfi, Barcelona.
332. Brukarz Herman, Międzyrzec.
333. Zinganell, Eisenach.
334. Sirobek Otto, Eisenach.
335. Link Karl, Heidelberg.
336. D-ro Möbusz Albin, Lübeck.
337. Selmer Heinrich, Lübeck.
338. Stein Anni, f-ino, Lübeck.
339. Haase Frieda, f-ino, Lübeck.
340. Weltzmann Elisabeth, s-ino, Oederan.
341. Weltzmann Hilde, f-ino, Oederan.
342. Weltzmann Elfride, f-ino, Oederan.
343. Weltzmann Günter, Oederan.
344. Janik Johann, Witkowitz.
345. Bierhoff Friedrich, Westhofen.
346. Liedlke Albert, Holzen/Schwerte-Ruhr.
347. Stralmann Georg, Schwerte-Ruhr.
348. Leuschner Gustav, Schwerte-Ruhr.
349. Voss Willy, Schwerte-Ruhr.
350. Eismann Gustav, Schwerte-Ruhr.
351. Kupfer Friede, f-ino, Stettin.
352. Klass Gertrud, f-ino, Stettin.
353. Raackel Walter, Stettin.
354. Müller Otto, Dölzchen/Dresden.
355. Petermann Hermann, Schwerte-Ruhr.
356. Merkert Elza, s-ino, Lodz.
357. Schwarz Eugenie, s-ino, Lodz.
358. Wallinger Hans, Saalfeld.
359. Wallinger Antonia, s-ino, Saalfeld.
360. Neumayr Anton, Saalfeld.
361. Neumayr Lina, s-ino, Saalfeld.
362. Huitegger Valentin, Saalfeld.
363. Katner Karl, Saalfeld.
364. Egger Hans, Saalfeld.
365. Geesner Josef, Saalfeld.
366. Bayer Heinrich, Saalfeld.
367. Bayer Ulrich, Saalfeld.
368. Roffensteiner H., Saalfeld.
369. Schwarz Oskar, Wien.
370. Schwarz Hanna, s-ino, Wien.
371. Seidel Karl, Crimmitschau.
372. Hebing Ferdinand, Köln.
373. Kaweck Wiadyslaw, Danzig.
374. Aeltermann Bernhard, Danzig.

(Daŭrigota).

Kiune jam aliĝis, aliĝu tuj!

Esperantista klubo de Arnau (Ĉeĥoslovakujo) interŝanĝas
leterojn kaj il. poŝtarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Jos. Kraft, en Kladno 1601 (Ĉeĥoslovakujo) deziras
ŝanĝi poŝtmarkojn kontraŭ tiuj de Ĉeĥoslovakujo.

Anglaj partoprenintoj de la XV-a Juna germano deziras
seriozan interkorespondadon kun junaj fraŭlinoj anglaj,
kiuj partoprenos certe la XV-an. Nepre ĉiuj tuj ricevos
respondon. Skribu al: Philipp Hahn, c/o Mrs. Höller,
Götzenkirchen-Horrem, bei Köln s. Rh.

August Kass, Litva tee 36/12 en Tartu (Estonujo) deziras
korespondi letere kaj poŝtkarte kun inteligentaj homoj
(precipe fraŭlinoj) ĉiulandaj pri diversaj temoj: univereal-
ismo-homo, universo, nacio, socio; sekva problemoj:
unika imposto de Henry George; naciaj mitoj kaj moroj;
natura, nudkulturo, vojaĝado, vagado; aktuala Rusujo;
kaj pri aliaj seriozaj kaj frivolaĵoj temoj kun homoj jun-
animaj. Kun stabiligitaj gekorespondantoj ŝanĝas foto-
grafajojn. Postaj filatelioj kolektiuloj kaj ŝanĝistoj ne mal-
trankviliĝu.

G. van Acker, Bergendries 106, Lokeren (Belgujo), deziras
korespondi il. pk. kaj letere kun gesamideanoj de la
tuta mondo. Interŝanĝas fotografajojn.

S-o Johano Nyerges (24 jara fraŭlo) Budapest, Nador u. 27
(Hungarujo) deziras korespondi kun ĉarmaj fraŭlinoj el
Holando, Danlando, Franclando
Filatelistoj! Kiu sendas al mi, Jozefo Lantos, en Kaposvar,
Erzsebetstr. 4 (Hungarujo) 3 kr. ĉ. aŭ 1 frankon (iu ajn),
ricevas de mi 50 beleajn sendefektajn hungarajn poŝt-
markojn

S-o V. Pukert, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj,
50-100 (Ne Germ.), s-o Bruno Gähler, antaŭe en Trau-
tenau sciigas sian novan adreson. Ambaŭ: en Reichen-
berg, St. Gewerbeschule W. 1. (Ĉeĥoslovakujo).

Francaj poŝtmarkoj, 1850-1922, ankaŭ sigelmarkoj dezir-
ataj. Sendos koloniajn poŝtmarkojn, poŝtkartojn aŭ
aĉetas. K. R. Sturmer, 40, Giebe Place, London, S. W. 45.
(Anglujo).

S-o Alf. Sover, Nömmé, Estonio, deziras interŝanĝi poŝt-
kartojn ilustr. de ĉiukajulo, naciajn ĵurnalojn, moner-
tojn ktp.

S-o Alfred Be'ém, S. Balesna 25, Tallinn, Estonujo, deziras
korespondi per poŝtkartoj ilustr.

Kvin amikoj deziras korespondi kun alilandaj gesamide-
anoj per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr. Skribu al Albert
Klemm, Maria-Theresienstr. 9, Gladbeck i/W., Germanujo.

Anoj de la Esperanto-grupo en Wiesdorf deziras kore-
spondi kun la tuta mondo per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj
kaj interŝanĝi gazetojn kaj Esperantaĵojn. Turnu vin al
s-o Adolf Wiesner, Wiesdorf apud Köln, Kölnstrasse 281,
Germanujo.

Filatelistoj! Mi vendas diversajn poŝtmarkojn Bulgarajn.
Mi sendas ankaŭ specimenojn por elekto kontraŭ rekom-
endo aŭ deonpago. Konstantin Vassilev, Andreeva 1,
Rusćuko, Bulgarujo

Spiry Elek, universitatano en Budapest VIII, Jozef körút 65,
IV e. 5 deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn (bfl.)
poŝtmarkojn (laŭ deziro laŭ katalogo) kaj monerojn ktp.
Deziras korespondi kun ĉiulandanoj, precipe universitat-
anoj pri studentaj vivo kaj aferoj.

F-ino Erna Schindler, liceano, 17-jara en Oels (Schlesien,
Germanujo) Blüchersstr. 3/1 deziras interŝanĝi ilustritajn
poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj monerojn kun ĉiuj landoj.

25-jara komercisto de la vestofako aerĉas korespondadon
pri komercaj temoj, precipe kun partoprenintoj de la
XV-a. Skribu al: Siegfried Baer, Roth bei Nürnberg,
Bayern, Germanujo.

S-o Arthur Boulande, Van Arveelde 75, Antwerpen, Belgujo
deziras korespondi kun alilandaj samideanoj.

F-ino Maria Lerno, Vrijheidsplein 2, Lokeren, Belgujo,
deziras interŝanĝi kartojn ilustr. leterojn kaj poŝtmarkojn
kun ĉiuj landoj.

Poŝtkartojn ilustr., leterojn kaj poŝtmarkojn interŝanĝas
kun gesamideanoj de la tuta mondo: Robert De Jaegher,
Markt 1, Lokeren, Belgujo.

S-oj Sven V. Johansson, St. Nygatan 52, Gislaved, kaj
Sven Hof, Gyllenfors, Gislaved, Svedujo, deziras kore-
spondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. Petas
legeblan adreson.

S-o Ignasi Coma, G. Juehus N. 8, Manresa, Hispanujo,
deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo
por ilustr. poŝtkartoj aŭ leteroj pri pejzaĝoj, kostumoj,
historioj, legendoj kaj similiaj temoj. Kie ankaŭ pri
elekto kun ĝiaj plej novaj eltrovaĵoj.

S-o Karl Pressel Kuimets, Juura, Estonujo, deziras inter-
ŝanĝi poŝtmarkojn (stampitajn) kontraŭ poŝtkartojn ilustr.
Li deziras ankaŭ korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj
landoj.

Otto Nitsche, Berlin, Petersburgerstr. 46, sendas tuj 100
germanajn poŝtmarkojn por la sama kvanto de alia lando.

Felikkao Jašaooro, ĉe la Grupo Esperantista, air. Merced 1,
Bilbao (Hispanujo), deziras korespondi kun portugaloj,
rusoj, danoj, norvegoj, svedoj, baltikanoj kaj ekster-
eŭropanoj.

S-o Frans Albert Quist, Hola Folkhögskola Prästmon.
Petrus Thelin, Hvolmsia Nordingrå Emil Olsson, Sol-
söher, Algol Sohlin Almsjön, Ul önger kaj Otto Mélander,
Hola Folkhögskola Prästmon, aliaj en Svedio, deziras
korespondi kun gesamideanoj en tutan mondon.

Rim. de Red. Se tiu ĉi anonco enhavas ankoraŭ
erarojn, bonvolu ne riproĉi nin, ĉar ankaŭ la dufoje
senditan manuskripton ni ne povis decifri en la sved-
lingva parto.

Ernst Hohl, Trautenau, Trautenbergstr. 51, Bohemlando,
deziras korespondi kun la tuta mondo per leteroj kaj
vidajkartoj, interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.